

ESPERANTO

Internacia Gazeto eldonata de la Universala Esperanto - Asocio

Lingvoj de malgrandaj popoloj

Difino - Superrigardo - Ilia situacio en Europo - Utilo de Esperanto - Maniero de propagando
Praktikaj rezultoj - Nova fako de agado

Difino

Lingvoj de malgrandaj popoloj, aŭ lingvoj parolataj de malplimulto. Ofte uzataj esprimoj, ofte miskomprenataj. La vortoj « malgranda » kaj « malplimulto », premisas do unue la malon, t.e. « granda » kaj « plimulto ». La plimulto do estas granda, multnombra nacio aŭ popolo, kiu sur sia nuna teritorio « gastigas » genton aŭ popolon, sin diferenciganta de l' ĉirkaŭa mondo, per aliaj kutimoj sed ĉefe per alia lingvo. Nova vorto en nia lingvo estas por malplimulto « minoritato » uzita por redoni la signifon de l' vorto — minorité —, afero ludinta tiom gravan rolon okaze de la pakkonkludoj en 1919-1920.

Kie estas plimulto kaj malplimulto, estas konfliktoj, luktoj, senĉesaj ĉikanoj. Ĉi-tiuj povas esti pro principaj, organizitaj kaj bazantaj sur ia doktrino. En ŝtatoj, politike evoluigintaj, kun firma centra povo, la rimedoj niveligi kaj asimili fremdajn sur propra tero estas aliaj, pli mildaj sed des pli efikaj. Lernejo, militservo, facila intermiksiĝo estas faktoroj tiom gravaj kaj efikplenaĵoj en la nivelo, ke la perforta procedo « per fajro kaj glavo » ne plu uziĝas. La historio de Eŭropo en la lasta jarcento estas intime ligata al la problemoj de la gentaj kaj lingvaj malplimulto, kreintaj en gravaj regnoj la tielnomitan « iredentisman », kaŭzo de venenigo de la politika atmosfero antaŭ, dum kaj post la milito. Iun solvon trovis la problemoj en la tielnomata « Rajto de la malplimulto », reguloj kaj devoj de aro da regnoj kontraŭ iliaj malplimulto. Ne estas sekreto, ke tiu-ĉi devigo, sentata kiel limigo de suvereneco, nek kontentigas plimulton regantan, nek malplimulton regatan. Sed tio ne interesas nin en tiu ĉi studo.

Superrigardo

Ni jetu rigardon sur la malplimulto en Eŭropo. Ni devas tiuj diferencigi. Estas tri grupoj da ili. La unua grupo de malplimulto, estas tiuj, kiuj trovas moralan apogon en allanda regno, sekve laŭ lingva vidpunkto ĝenerala, ne estas malplimulto. Tio rilatas ekzemple al germanaj malplimulto en aro da ŝtatoj, la ukrainaj (rutenaj), la polaj, k. t. p. La dua grupo estas tiuj lingvoj, kiuj estas

efektive malgrandaj. Ili povas esti sendependaj politike, ekzemple, estona, latva, litova lingvoj kaj aliaj, samtempe kalkulantaj popolerajn en aliaj regnoj, kun aŭ sen protekto lingva. La tria kategorio estas la efektivaj « sortbaritaj », kiuj estas parolataj de malgranda nombro, ne ĝuas ian oficialan protekton, ne povis produkti konsiderindan literaturon kaj kiuj estas sub premo duobla: materia kaj morala. Ĉi tiu premo duobla estas ŝuldata al ĉirkaŭstancoj kvazaŭ naturaj, kiel ekzemple la kaptiga influo de kultura lingvo kun riĉa literaturo kaj kun tutmonda konsidero. Ĉi tiuj kulturlingvoj simple absorbas la etulojn, kaj popolo tiam, malaperas etne kaj lingve. Esceptoj ekzistas ankaŭ. Se la grandaj popoloj ne povas kaj ne volas protekti lege tiajn etnajn kaj lingvajn malplimulto, kiuj troviĝas en iliaj respektivaj landoj, tiam ekzistas tamen aliaj, kiuj tian faras. Ĉitinda estas la ekzemplo en Svislando, kie la popolo voĉdonas en tiu ĉi jaro, por ke la retoromana lingvo, parolata de 40000 homoj, fariĝu oficiala lingvo, apud la germana, franca, itala. Alia fakto ne malpli interesa estas la oficialigo de multaj idiomoj, (kiujn okcidentanoj eĉ ne konis laŭnome) en Soveta Respubliko. Du ŝtatoj, unu malgranda, la alia ĝiganta laŭ amplekso, el malsamaj vidpunktoj plenumis kulturalan agon.

*

**

La jena artikolo ne celas doni kompletan priskribon de tiu-ĉi problemoj, sed informi ĝenerale en grandaj linioj. Pro tio la nuna listo de tiuj malgrandaj lingvoj, limiĝas al tiuj en Eŭropo.

Armena (Balkano, Turkujo, USSR)

Baska (Francujo kaj Hispanujo)

Bretona (Francujo)

Frisa (Germanujo, Nederlando)

Friula (Friulo, en Italujo)

Juda (Jargono: Bulgarujo, Jugoslavo, Balta landoj, Polujo)

Kimra (Britujo, Wales)

Kucovalaka (Albanio, Greklando)

Lapona (Nordo de Skandinavio)

Macedoslava (Greklando)

Malta (Sur Malta Insulo)

Romanĉa (Svislando)

Soraba (slavo), loĝantaj en

Spree-arbaro kaj en Luzico)

Spanjola (Levanto)

Tatara (Bulgarujo, Rumanujo)

Povas esti, ke tiu ĉi listo ne estas kompleta. Mankas la idiomoj de la ĉinanoj vagantaj en ĉiuj landoj kaj kiuj — laŭ lingva vidpunkto — prezentas ion tute apartan.

Ilia situacio

La foresto de subteno materia kaj morala sekvigis, ke aro el la nomitaj idiomoj ne povis evolui literaturan konsiderindan. El kio sekvis la neniam pruvita aserto « lingvo malkapabla por atingi pli altan gradon de kulturo » kaj similaj eldiraĵoj. Kaj de tiu-ĉi kvalifiko ĝis plena malestimo ne estas granda paŝo. En la momento, kiam la ĉiopova ŝtato deklaras ion nedezirinda, la batalo pro ekzisto fariĝos senespera. Tamen, malgraŭ ĉio tio, oni povas konstati kun miro, kiom obstina, kio rezistopova estas lingvoj. Tio permesas konkludi, ke ekzistas io mistera, nekompata, kio kapabligas la homojn konservi kontraŭ konstantaj ĉikanoj la amatan parolaĵon de la prapatroj. Meze de potencej idiomoj, kies kono vastigas horizonton kaj prezentas ekonomian avantaĝon por la parolanto, postrestas forgesitaj lingvoj atendantaj alveni tagon de reviviĝo.

Kie leĝaro aŭ naturaj kondiĉoj tiom permesas, ĉi-tiuj lingvoj evoluigas, kvankam malrapide. Grava helpo por ilia firmiĝo estas la traduko de la Biblio, libro kiu ja ankaŭ utilis kiel bazo por aliaj lingvoj eĉ potencej laŭ nombro de parolantoj. La fakto, ke serio de forgesitaj lingvoj, vegetintaj kaŝe, konitaj en fremdlando nur de scienculoj, ree lndas rolon de publika parolaĵo, influis en certa grado ankaŭ tiujn, kiuj ne povas esperi politikan sendependecon. Troviĝas homoj kiuj batalas por la rajto de l'instruado elementa en la koncerna lingvo, aŭ kiuj entreprenas la reguligon de la lingvo en gramatiko, vortaro, ekzistanta literaturo. Kun kelkaj esceptoj vidiĝas sukceseto en tiu ĉi klopodo.

Utilo de Esperanto

La internacia lingvo, ĉu ĝi povas esti utila en tiu ĉi batalo? Ĉu INTERNACIA estas ligebla al NACIA? Ĉu fine Esperanto devas enmiksiĝi en tian lukton?

La Deklaracio de Bulonjo, diras interalie....

..... donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi intersi, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas intersi pri la lingvo, kaj en kiu povas esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.

Tio sufiĉas. Kaj de tiu ĉi difino de uzo certe tre ideala kaj realigota eble post pliaj jardekoj, estas nur plia paŝo al vasta uzado de Esperanto, pere de anoj de tiuj forgesitaj lingvoj por konigi sin al eksterlando, por varbi amikojn, por propagandi tute simple. La spertoj faritaj en tiu ĉi sfero rajtigas tian uzadon. Ne estu forgesata kiom multe utilis Esperanto al nombro de lingvoj, hodiaŭ oficialaj iam batalintaj por rekono aŭ konateco.

Maniero de propagando

Se unflanke Esperanto povas servi kaj servis en tiu ĉi okazo, kiel oni propagandu Esperanton inter tiuj lingvanoj? Tio estas iom delikata demando, facile oni riskas esti mikstata en aferojn tute ne koncernantaj nin. Atentinda ekzemplo estas la kazo de la bretona lingvo-movado, kie Esperanto trovis jam kelkajn amikojn. Unua necesajo estas, la lernolibro de Esperanto en la koncerna lingvo. Kaj se lernolibro ankoraŭ ne estas farebla, tiam la aperigo de sloŝlo de Esperanto estas la unua paŝo farenda. En nia propagando, inter la anoj de ĉi-tiuj forgesitaj lingvoj, ni devas akceli ĉefe la eblecon kontaktiĝi per neŭtrala idiomoj kun lingvaj samsortanoj en aliaj landoj, informiĝi per ĝi pri faritaj spertoj, kaj ĉiel uzi Esperanton kaj ĝian organizon por praktikaj bezonoj. Eble iam povus formiĝi pere de Esperanto, organizaĵo inter tiuj lingvanoj por

doni necesan apogon al iliaj klopodoj.

Praktikaj rezultoj

Parolante pri praktikaj rezultoj, estas konsciata tiaj favore de nia lingvo. Kaj tiurilate oni devas lerni el la spertoj faritaj. Malmultaj hodiaŭ memoras tempon, kiam la ĉeĥaj (tiam nomitaj bohemiaj) Esperantistoj klopodis pere de Esperanto por konigi naciajn kaj lingvajn dezirojn. Kaj tiukaze ne temas pri malgranda lingvo. Alia ekzemplo estas la kimra. Kiu el la legantoj scias ion pri kimra lingvo, antaŭ interkonatiĝo kun Esperanto? Estas malmultaj! Nu, ankaŭ kimraj esperantistoj procedis tute same kaj, per gazetartikoloj, per partopreno de la kongresoj esperantistaj dokumentigis sian ekziston kaj konigis siajn aspirinojn. Alia ekzemplo estas la kataluna, lingvo de malgranda popolo, hodiaŭ oficialigita. La katalunaj esperantistoj sin servis de Esperanto kaj per la organizo de FLORAJ LUDOJ, (literaturaj festoj) altiris vastan atenton en la propra lando. Oni povus multigi la ekzemplojn, sed necesas nur montri la tipajn.

Menciinda en tiu ĉi direkto estas ankaŭ alia traĵto. La katalunaj esperantistoj, fieraj je lingvo malnova kaj valorata, dokumentistion per eldono de Antologio, vera perlo de ilia kaj nia literaturo. Kaj tiu-ĉi verko instigis aperigi similajn en aliaj lingvoj, penadantaj diskonigi siajn spiritajn valorojn.

Resume oni povas diri, ke la praktikaj rezultoj el tiu-ĉi agado estas atentindaj, rajtigantaj etendi ĝin ĉe aliaj.

Nova fako de agado

Vidiĝas nova fako de agado por la propagando. Kiel kaj kiamaniere ĝi estu organizata, estas objekto de vasta ekzameno, entreprenata de samideano kompetenta en la materio. De tempo al tempo aperos informoj en ESPERANTO pri faritaj aŭ farotaĵoj. Personoj havantaj intereson aŭ povantaj servi per utilaj informoj estas petataj sin anonci al la Propaganda Servo de UEA.

H. J.

Universala Esperanto - Asocio

Centra Oficejo : I, Tour de l'île, Genève, Svislando

Lingvaj minoritatoj (Lingvaj malplimulto)

La lingvo bretona

En la anoncita serio de artikoloj pri lingvaj malplimulto, la nuna artikolo ritatas al libro aperinta antaŭ nelonge. Tiu ĉi libro titoligas « La Langue bretonne », ce qu'elle fut, ce qu'elle est, ce qui se fait pour elle et contre elle. (La lingvo bretona, kio ĝi estis kio ĝis estas, kion oni faras por kaj kontraŭ ĝi). Bonege verkita, de Marcel Goueyssse, sen amara sento kaj sen insulto kontraŭ la pli forta en la batalo, tiu ĉi libro prezentas la situacion de forgesita gento. Ni penas prezentii resumon koncizan kaj tamen elcerpan. (Red.).

Kio estas bretona ?

Bretonoj estas « malgrand-britoj » tute simple. La radiklo « bret » estas alia formo de brit'. Per bretono oni nomas hodiaŭ la loĝantojn de la Malgranda Britujo, la Petite-Bretagne kiel distingo al tiuj de la Granda Britujo, la Grande-Bretagne. La iama duklando Bretonio, poste provinco franca estas loĝata de gento veninta el Britujo. En la nuna

parolantoj. Rimarkinda estas konstati, kiel longtempe poras resti vorto, eĉ se la afero esence ŝanĝiĝis. Tiel nunaj germanoj kaj svisoj nomas per Welsch' la francojn, kiuj tamen ne estas plu identaj al la originaj loĝantoj laŭ popoleco.

Kiel najbarojn la keltoj renkontis la germanojn (ne germanojn, kio estas io tute alia) kaj la latinparolantajn romanojn. Ambaŭ estis ankaŭ iliaj ĉefaj malamiko, kaj la politika malapero de la kelta gentaro estis ĉefe ŝuldata al la premo de potenco Romo, helpita parte de germanaj triboj.

Hodiaŭ ekzistas keltoj gentoj parolantaj keltan lingvon en Wales, nomata ankaŭ kimra lando, en Skotlando, en Irlando kaj en franca Bretonio. Neforgesinde estas, ke la irea, la oficiala lingvo en Irlanda liberŝtato estas kelta idiomo, renaskiĝinta kun la politika sendependiĝo.

Lingva renaskiĝo

La postmilita tempo vidis multajn fenomenojn inter kiuj la

regadformoj en Francujo, de la francaj reĝoj al la konvencio, de la Imperio al la reĝimoj sekvantaj Napoleonom; se ili ŝanĝiĝis en multaj aferoj la trajton de Francujo: en unu rilato ili ĉiuj similis. Sur franca tero, franca

« Gwalarn » (= Nord-Okcidento) kies redaktoro Roparz Hemon estas esperantisto. Alia revuo en la dialekto de Vannes estas « Dihunamb » (= Ni revekiĝu). Ateŝtinda estas ankaŭ, ke inter kelkaj bretonoj montriĝas profunda intereso

konstantaroj kaj aro da sciencaj societoj voĉdonis favore al lerneja instruado bretona. Nedubla estas la morala influo, kiun ekzercas la metoda modernigo de la irea (gaela) lingvo kaj la flegado de la kimra en Wales. La aserto pri fuŝa uzado de du lingvoj (bretona kaj franca) kontraŭ bona uzado de unu (la franca) ne estas pruvebla. Ekzistas aro da landoj, kie dulingveco ne prezentas tiom da komplikaj kiel oni ĝenerale kredigas. Necesas vasta informo agado, por ke la publiko komprenu motivojn kaj celojn. Kaj en tiu ĉi agado la menciita verko bonege plenumas sian rolon.

Lingva komparo

La parencoj al la bretona lingvo estas la kimra, (Wales) la gaela, (Irlando kaj Skotlando). Vidinda estas la skriba aspekto de ĉi-tiuj idiomoj. Servu por tio la jena teksto el « The Gospel in many tongues » de la cititaj lingvoj:

Bretona : Dialekto de Leon

Rag Doue hen deuz karet kement at bed, ma hen deuz roet he Vab unic, evit na vezo ket kollet pioubenag a gred enhan, mes ma hen devezo ar vuez eternel.

Gaela : Skota Altlando

Oir is ann mar sin a ghrádhach Dia an saoghal gu'n d' thug e aon-ghin Mic féin, a chum cò air bith a chreideas ann, nach sgrìosar e, ach gu'm bi a' bheatha shìorruidh aige.

Irlanda : Liberŝtato Irl.


Oir is mar so do grádhugh Dia an domhan, go dtug sé a éinghein Meic féin, ionnús gídh bé chreideas ann, nach rachadh sé a mughá, achd go mbéith an bheatha shìorruide aige.

Kimra : Wales, Kimrujo

Cany's felly y carodd Duw y byd, fel y Rhoddodd efe efi unig-anedig Fyb, fel na choller pwy bynnag a gred ynddo ef, ond caffael o hono fywyd tragywyddol.

Esperanto : Internacie.

Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke li donis sian solenaskitan flon, por ke ĉiu kiu kredas je li, ne pereu, sed havu eternan vivon.



Th. Hersart de la Villemarqué, Bretona leksigrafo

lingvo. Oni rajtas diri, ke la franca karaktero ne emas je krudaj rimedoj. Oni kalkulis je la nekontestebla altirpovo de la franca lingvo al lernantoj aŭdintaj hejme nur bretone. « Oni instruas en lingvo, kiun la lernantoj ne parolas kaj oni parolas en lingvo, kiun oni ne instruas », diras la verkinto en sia libro. Naskiĝas el tio konfuzo kaj ĉe multaj malŝato. Kaj por finiĝi tion, la defendantoj de la bretona lingvo postulas, ke la nuna instrua lingvo estu la propra. Praktike tio kondukas al dulingveco, aperaĵo konata ankaŭ en aliaj landoj.

al la internacia lingvo. En du lokoj, la libro citas Esperanton, kies rolon oni perfekte komprenas.

Estonto

Ĉu ĉi-tiuj klopodoj havos la esperatan sukceson? Se oni juĝus laŭ la franca gazetaro, ŝajnas ke ne. Generale la sinteno de kleraj francilingvanoj, rilate al la problemo de lingvaj malplimulto en propra regno, estas tiu de triĉa onkio al mizera parenco. Iuj vidas en la laboro por la bretona lingvo politik-reakcian agadon, aliaj vidas la manon de Moskvo. Nu, la bretonoj ne havas politikan aspiron, ne ekzistas potenca regno kiu volus revenigi devojiĝintan flon. Kaj ŝajnas al bonvola observanto, ke precize en la foresto de iu ajn politika karaktero, troviĝas la forto kiu garantios sukceson. La tuta penado ja ne estas verko de iuj manuloj, sed radikanta en popola grundo. Tion pravas la fakto, ke ĉirkaŭ ducent urbaj

Lingva agado

La agado por evolui la bretonan, je kampara idiomo al kultura esprimo datiĝas jam de antaŭ pli ol cent jaroj. Leksikografoj, lingvistoj, folkloristoj bretonaj esploris, kolektis, klasigis ĉiun materialon kaj per tio preparis la fekundan teron sur kiu la postulo je oficiala konsidero trovos radikon. La ideo, ke temas pri idiomo primitiva, nekapabla redoni modernajn esprimojn, trovis jam praktikan refuton. Inter la homoj kiuj distingiĝis en tiu ĉi klopodado, estu citataj la nomoj de Jean François Le Gonidec, (1775-1838) Th. Hersart de la Villemarqué (1815-1895) François Luzel 1821-1895) Emile Ernault kaj François Vallée. Gigantan laboron plenumis ĉi-tiuj viroj, veraj kreintoj de lingvo el parolado nomita barbara. Hodiaŭ tuta aro da junaj fortoj daŭrigas tiun ĉi pioniran laboron, polurante, glatigante kaj formante la lingvon per originalaj kaj tradukaj verkoj. La proksima celo de la agado estas atingi unuformecon de kvar ĉefaj dialektoj, penado kiu havas analogiojn ankaŭ en aliaj lingvoj formiĝintaj. Inter la periodaĵoj celantaj formi la lingvon estu citataj



Jean François Le Gonidec, Bretona leksikografo

divido de Francujo, Bretonio formas la departementojn Finistère, Côtes du Nord, Ille et Vilaine, Morbihan, Loire Inférieure.

La origino


La bretona gento, veninta dum la sesa jarcento de nia epoko el Britujo por ekloĝi en la senhoma landparto ankoraŭ nun okupata de iliaj posteuloj, estis britoj. Ili estas do keltoj. Valoras precizigi tiun ĉi vorton. Per kelt' oni komprenas la tutajn de tiu-ĉi tribaro, kiu okupis komence de la kristana epoko vastajn landojn, Balkanon, parton de Italio, tutan Francujon, parton de nuna Germanio, Belgujon, Svislandon, ja eĉ Malgrand-Azion k. a. Atestantoj neforviŝeblaj de ilia ekzisto estas sennombraj lokumoj en ĉiuj tiuj landoj.

La keltoj estas konataj al ni sub pluraj nomoj, aparte de la nomoj de keltoj triboj. Se en Francujo oni parolas pri gaulois, en Britujo pri welsh, la germanoj pri Welsch, la ĉeĥoj pri vlach, kaj la Biblio pri galat', ĉio tio estas nur transformoj de sama radikvorto kelt' en la buŝoj de la

renaskiĝo de forgesitaj lingvoj, estas malpli atentata. Kiu estus pensinta antaŭ jardekoj, ke la klasika hebrea lingvo fariĝos oficiala parolado en Palestino? Kaj serio da lingvoj, ŝajne kondamnataj esti englutitaj de potencaj najbaroj, reviviĝis, dank' al politikaj ŝanĝoj kiujn ni ja vidis preterpasi. La solemaj deklaroj pri la rajto de memdecido faritaj de ŝtatestoj, vekigis kvazaŭ el profunda dormo ankaŭ aliajn forgesitojn. Kaj inter ili troviĝas la bretonoj, kiuj per pacaj rimedoj deziras atingi la rajton instrui kaj uzi la lingvon de la prapatroj.

Nuna situacio

La bretona lingvo parolata de kampara popolo (1,5-2 milionoj) spertis la sorton de ĉiu venkito. Tamen, la maniero laŭ kiu tiu ĉi lom post ioma malapero okazas, estas esence malsama, ol tiu, kiun oni konstatas alilande, kontraŭ aliaj mortantaj idiomoj. La praktiko de la franca registaro kontraŭ fremdaj parolantoj sur la franca tero estas dikta el la deziro konservi lingvan unuecon de la lando. Kaj estas rimarkinda trajto, ke ĉiuj



Emile Ernault, Bretona folkloristo

Tombo de Zamenhof, belaj aranĝoj, Festo de la Veteranoj Kun malpacienco atendas alvenon de la kongresanoj